



MALGRANDA

N:RO 2 **REVUO** 1945

3-a JARO

PREZO: 1:-- Kr.

ENHAVO:

	Paĝo
ESPERANTO KAJ LINGVA SENTO de Stellan Engholm	1
NEDERLANDO DUM LA MILITO de W. Veldman	9
LUKTO KAJ ENMETO de van der Stempel	14
KIEL BESTOJ KONDUKTAS de P. Th. Justesen	16
SCIENCISTOJ, DIPLOMATOJ KAJ DEMOKRATOJ de St. Fink-Jensen	25
SCIENCO KAJ ESPERANTO de Dro A. Mildwurf	28

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Esperanto kaj lingva sento

De STELLAN ENGHOLM

En nro 3—4 1945 de Esperanto Internacia troviĝas artikolo titolita Lingva Sento. La verkinto, Ismael Gomes Braga, rakontas, ke li en sia nacia lingvo legis libron de verkisto, kiu naskiĝis en alia lando sed longe vivis en Brazilo kaj scias la landan lingvon. La lingvo en la libro estis korekta, tamen ĝi iel ne plaĉis. Sinjoro Braga ne povis kompreni kial. Filologo donis respondon: la verkinto "scias" la lingvon, sed li ne "sentas" ĝin, ĝi estas por li fremda lingvo.

Post tiu klarigo sinjoro Braga komprenis, kial li, malgraŭ vasta studo de la angla lingvo, ne povas paroli angle tiel kiel la angloj mem. La angloj havas "senton" por la angla lingvo, li ne.

"Tia lingva sento estas io sankta, neklarigebla, kio apartigas la homojn per nedifinebla antipatio." — "Ĉu ankaŭ en esperanto ekzistas tiu lingva sento? Ne, ĝi estas nenies nacia lingvo. Ni ĉiuj lernas ĝin kiel fremdan lingvon kaj ne ofendiĝas, se iu alia scias ĝin ne tiel perfekte kiel ni mem."

La cititaj asertoj meritas atenton. Precipe la lasta tuŝas gravan punkton.

Ni unue okupu nin pri la unua aserto pri la lingva sento.

En mia hejmo vivis dum dek jaroj juna parenco, knabo, kiu naskiĝis en Berlino kaj loĝis tie, ĝis li havis kvin kaj duonan jarojn. Tiam li venis al ni. Li tiam tute ne parolis kaj same malmulte komprenis la svedan lingvon. La germanan lingvon li mirinde bone posedis. Li estis vivinta en tre favora lingva medio, kaj lia provizo da vortoj, esprimoj kaj frazkonstruoj egalas almenaŭ al tiu de inteligenta dekjarulo. Kiam ni interparolis kun li kaj estis necertaj pri sekso, fleksioj aŭ aliaj aferoj, li senhezite donis korektan informon. Ĉu li havis "senton" por la germana lingvo? Certe. Lia "sento" por la germana verŝajne estis konsiderinde pli granda ol ĝi estas ĉe la pli multaj svedaj instruistoj de la germana lingvo.

La unuajn monatojn li persiste rifuzis lerni la svedan. Kiam li komencis iom kompreni ĝin, li tamen respondis germane al sveda demando. Post duonjaro li neatendite por ni kaj per unu sola paŝo transiris al la sveda. Lia nova lingvo malmulte similis al kulturita sveda, ĉar li estis lerninta ĝin de ludkamaradoj kaj afablaj gemaljunuloj, kaj ĝi estas la loka dialekto en ĝiaj plej orekfrapaj formoj. Tiun lingvon li ekŝatis kaj diligente perfektigis sin en ĝi. Post kelkaj jaroj li egalas al la maljunaj indiĝenoj rilate al vortoscio, elparolo, nuancosento kaj frazkonstruado. Dume li forgesis la germanan, ĉe konscie klopodis forigi el sia memoro ĉion germanan. Estis dum la epoko de Hitler, kaj scio de la germana ne estis merito inter svedoj.

En la popola lernejo li en la sveda lingvo superis la pli multajn el siaj kamaradoj. Ĉiam li demandis klarigon pri vortoj kaj esprimoj, kiuj ne estis tute klaraj por li, kaj tial lia efektiva vortprovizo estis pli granda ol tiu de la aliaj infanoj. Ĉu li nun havis "senton" por la sveda lingvo? Jes. Ĝi estis same forta kaj certa kiel iam lia sento por la germana.

Kiam li estis dektrijara li komencis lerni la germanan en mezlernejo. Tiam lia sento por la germana estis tute for. La seksojn de la substantivoj li senzorge intermiksas, la germanan parolmanieron li ne povis retrovi, esprimojn kaj frazojn li konstruis laŭ sveda modelo. — Tiaj transiroj

al aliaj lingvoj okazis kaj okazas ĉie en la mondo. Se temas pri infanoj, la sento por unu lingvo post mallonga tempo estas anstataŭata de sento por alia.

La lingvosento rilate al la propra lingvo ne estas io mistera kaj neklarigebla. Ĝi konsistas tute simple el tiuj lerto kaj certeco, kiuj devenas de ĉiama ekzercado. Kaj ekzercon ni havas ĉiuj superabunde. Fakte ni en neniu alia kampo de mensa agado havas tiom da ekzerco. Imagu kiom da ekzerco havas infano de sia unua lingva sono ĝis sia sepa jaro! En tiu aĝo ĝi ordinare povas bone paroli, kaj ĝi foje havas tre bone evoluintan lingvosenton. Tamen ĝia lingvo kaj la sento por ĝi estas tre limigitaj kompare kun la lingvo kiel tuto. Se mi al la knabo en la supra ekzemplo estus leginta paĝon el Faust aŭ gvidartikolon el Berliner Tagblatt, li estus povinta nenion diri pri la valoro de tiuj.

En tiu aĝo la pli grava parto de la lingvoscio estas akirita, kaj ĝi estas akirita sen peno kaj kun ĝojo. Poste komenciĝas la akiro de la kultura lingvo, kaj ĝi estas longa, peniga kaj ofte teda. La unuan parton de la lingvoinstruado prizorgas la naturo, la dua estas homa elpensajo. Verŝajne de tio dependas la granda diferenco. Sed ĉiuokaze la dua ŝtupo estas senfine vasta, oni devas enmemorigi senfine multe da detaloj, devas konscie kritiki, elekti kaj konstrui sian lingvon. En kulturlingvo kun vasta literaturo temas pri akiro de lerto kaj rutino, kiujn amaso da lingvomajstroj kun akiris dum multaj jarcentoj! Vere ne estas mirige, se ne ĉiuj dudekjaraj homoj kun abiturienta ekzameno povas verki kritikrezistan skribaĵon.

Kaj la granda plimulto, por kiu la fino de la elementa lernejo signifas finon ankaŭ de sistema lernado de la propra lingvo? Kompreneble ili ankoraŭ iom lernas, de gazetoj, libroj kaj parolantaj homoj. Sed ilia lernado estas pasiva observo. Ili tiel akiras certan imagon aŭ "senton" pri la kulturita lingvo, stilo en libro aŭ parolado plaĉas aŭ malplaĉas al ili, sed ili ne povas kontentige klarigi kial. Mankas ĉe ili konscia pensado pri lingvaj aferoj kaj

konscia klopodo perfektigi la propran lingvon. Tial tute ne estas mirige, se la pli multaj el tiuj ne povas skribi ordinaran leteron korekte. Tamen ankaŭ tiuj havas "senton" por la gepatra lingvo, kvankam ĝi neniel estas tiel vasta kaj certa kiel tiu de studento.

Se ni tiom ekzercas nin per uzado kaj sistema lernado, kiam temas pri la gepatra lingvo, estas ja evidente, ke ni ne povas lerni fremdan nacian lingvon tiel, ke ni povas uzi ĝin kiel nian propran. Nia kapablo ne sufiĉas por proprigi en dua lingvo tiun gigantan materialon, kiun ni dum dudek jaroj proprigis al ni en nia gepatra lingvo kaj kiun ni poste daŭre proprigas al ni. Kaj se kapablo sufiĉus, la disponebla tempo kaj ceteraj cirkonstancoj ne permesus tion. Krom tio ni en niaj pli multaj agadoj estas kutimigantaj. La pli multaj el ni tute ne povas akiri la ĝustan "senton" por manskribado per la maldekstra mano. En la lingva kampo ni tiom kutimiĝis al kaj fariĝis dependaj de parolmanieroj kaj aliaj proprecoj en la gepatra lingvo, ke ni ne povas forlasi ilin kaj tute transiri al novaj. Por infano, kies kutimoj ankoraŭ estas freŝaj kaj ne fiksitaj, estas pli facile transiri al alia lingvo.

*

Ni nun traktu la duan punkton. Sinjoro Braga demandas, ĉu en esperanto ekzistas tia lingva sento, kaj li mem respondas, ke ne.

Por ne esti maljusta mi devas diri, ke sinjoro Braga ne tute pravas. Verdire ekzistas lingvosento en la esperanta popolo. Kompare kun la granda nombro de la esperantistoj kaj tia cetere arda amo al la lingvo, la kraĉoj de tiu lingvosento kaj la pruvoj pri ĝi estas tamen tiel maloftaj kaj solitaj, ke oni devas aldoni, ke sinjoro Braga tute pravas.

Ĉu vere estas eble akiri tian senton por esperanto, ĉu oni havas por nia gepatra lingvo? Mi pretendas, ke ne. Kiel oni akiru ĝin? Same kiel ni akiras la senton por nia gepatra lingvo, escepte la unuaŝtupan lernadon de infano. Nur malofte iu komencas lerni espe-

ranton per imitado de vortoj kaj interparolo. Krome logiko kaj persona lingvokreado ludas en esperanto pli grandan rolon ol en naciaj lingvoj. Sed cetere estas la sama afero.

"Ni ĉiuj lernas ĝin kiel fremdan lingvon." — Komprenible ĝi estas fremda al ni, kiam ni komencas lerni ĝin, same kiel la homa lingvo estas fremda al ĵus naskita infano. Sed ĝi ne devas resti al ni fremda kiel lernita nacia lingvo. Neangloj povas diligente legi anglan literaturon dum dudek jaroj kaj pli, kaj la lingvo tamen restas al ili fremda kompare kun ilia propra. Tiel ne devas esti en esperanto.

Komencan kurson oni povas kompari kun la antaŭlerneja lingvolernado de infano. Oni lernas la samajn fundamentajn aferojn. Diferenco estas, ke infano lernas nekonscie, esperantolernanto konscie. Sed kontraŭe al lernanto de fremda nacia lingvo la esperantolernanto lernas aŭ ĉiukaze devus lerni tiel, ke la lingvo en la fino de la kurso ne ŝajnus al li fremda sed jam intime konata afero, kiun li ĝis certa grado povas mem regi kaj laŭ propra pensopovo uzi korekte, same kiel sesjara knabo uzas la gepatran lingvon. Li scias certan kvanton da vortoj, kaj li scias — kio estas tre grava — la tute precizan sencon de tiuj vortoj, li scias, kiel oni fleksas la vortojn kaj konstruas frazojn. Multege da vortoj kaj frazoj li povas mem konstrui, kvankam li antaŭe ne vidis aŭ aŭdis ilin. Por uzi tiun fundamentan parton de sia nova lingvo, li bezonas nur racie uzi sian propran pensopovon. Ĝi estas jam io, kion li ĝis certa grado mem regas, sekve io propra.

Bedaŭrinde ne ĉiam estas tiel. Kaj bedaŭrinde la daŭrigata studado ne ĉiam havas kiel rezulton veran proprigon de la lingvo kaj tiun lingvosenton, kiun ni pli malpli havas rilate al la gepatra.

Tro ofte oni lernas esperanton — mi pensas ne nur pri la komenco — same kiel nacian fremdan lingvon. Oni mekanike lernas vortojn, gramatikajn aferojn, esprimojn. Poste oni skribante kaj parolante same mekanike uzas la lernitajn aferojn kaj kredas, ke ĉio estas korekta kaj

bona. Esperanto estas nenies nacia lingvo — ĉu do estas bezonataj certaj reguloj krom la dekSES?

Se oni tiel lernas, uzas kaj ekzercas la lingvon, ĝi estas por la uzanto precize tio, kion eksteruloj opinias, ke ĝi estas: ia kodo, per kiu oni povas mekanike kaj ĝis certa grado komprenigi al aliaj personoj tion, kion oni volas esprimi. Uzado de la lingvo estas kvazaŭ solvado de krucvortaj aŭ aliaj lingvaj enigmoj: se ĉiu litero troviĝas en la ĝusta loko kaj la rilato inter literoj kaj vortoj estas ĝusta, la solvo nepre devas esti perfekta. Ĉe tia uzanto de la lingvo troviĝas malmulte da lingvosento. Lia esperanto ne estas vera, vivanta lingvo sed kodo.

Mi diris, ke ni akiru la "senton" por la lingvo, same kiel ni akiras ĝin en la gepatra. Detale mi ne povas trakti tion tie ĉi, sed mi donu kelkajn sugestojn.

Ĉiu esperantisto same kiel knabeto en nacia lingvo tute precize scias la signifon de la vortoj tablo, seĝo, pordo, kaj li ne intermiksas ilin. Eĉ se li lernas preskaŭ nur mekanike, ŝajnas al li memkompreneble kaj necese uzi ilin nur laŭ ilia senco. Jen la knabeto kun sia nacia lingvo fariĝas junulo kaj interesiĝas pri politiko kaj sociaj aferoj, sed la propra lingvo ne multe interesas lin. Aŭskultu, kiam li parolas, kaj vi trovos, ke multaj vortoj tute ne havas klaran signifon por li, kaj tial li fakte eĉ mem ne scias tute precize, kion li diras. Esperantistoj povas troviĝi en la sama situacio. Ili hontus skribi tablo, kiam devas esti seĝo, sed ili tute ne hontas skribi kaj diri farmisto anstataŭ terkulturisto, konsternigi anstataŭ konsterni, kaj centojn da aliaj vortoj ili eventuale povas uzi kun alia senco ol tiu, kiun ili vere havas. Vi diras, ke ili tamen povas kontentige komprenigi sin. Certe. Sed lingvosento ne estas en tio, lingvosenton tia uzo de la lingvo ne donas, kaj se tia uzo estus ĝenerala, esperanto neniam fariĝus internacia kultura lingvo.

Tiun mankon, se oni rekonas, ke estas manko, oni povas forigi. La rimedo estas la sama kiel en naciaj lingvoj: lernado. Ne tuj kaj senpene la gejunuloj akiras la kapablon korekte kaj bone trakti sian nacian lingvon. P l e n a

V o r t a r o estas mirinda helpilo por nia lingvoekzerco. Tia vortaron ne ĉiuj naciaj lingvoj posedas. Apud la zamenhofaj verkoj ĝi estas nepre necesa fundamento por la uzado kaj evoluo de la lingvo. La samon oni povas diri pri P l e n a G r a m a t i k o de Kalocsay. La lasta ne estas legaĵo por komencanto, sed ambaŭ libroj estas same necesaj por la lingvo.

Plena Vortaro devas esti norma mezurilo por nia uzado de esperanto. Sen tia mezurilo la lingvo fariĝas pli malpli objekto por naciaj kaj individuaj gusto kaj bontrovo. En ĝi ni trovas ne nur la signifon de la vortoj sed ankaŭ abundan kvanton da ekzemploj pri ilia ĝusta uzo en esprimoj kaj frazoj. Preterpase mi esprimu deziron pri Plena vortaro: iam estonte ĝi havu resumeton pri la etimologio de ĉiu vorto same kiel The concise Oxford dictionary en la angla. Tiaj klarigoj konsiderinde konkretigas kaj pliprecizigas la signifon de multaj vortoj.

Ni havas la rimedojn por necesa lernado. Ĉu ni, kiuj laboras por tiel grandioza celo kiel internacia kultura lingvo, rajtas esti malpli diligentaj kaj zorgemaj pri nia lingvo ol gelernantoj de la diversaj gepatraj lingvoj? Se ni diligente lernas kaj pripensas, ni akiras ankaŭ la deziratan lingvosenton, la kapablon klare distingi vortojn kaj nuancojn kaj elekti tiujn, kiuj estas ĝustaj.

En naciaj lingvoj la infanoj lernas esprimadon tiel, ke ili komence faras kiel eble plej mallongajn kaj simplajn frazojn, esprimas aferojn tre simple kaj klare. Poste ili iom post iom povas kunmeti pli da propozicioj kaj havi pli da vortoj en ili. Simpla, facile legebla stilo tamen ĉiam restas dezirinda.

Esperantistoj, precipe tiuj, kiuj pli malpli mekanike lernas la lingvon, ofte skribas, kvazaŭ ilia stila idealo estus germana profesoro en filozofio. Se ni volas lerni bone skribi kaj paroli, ni devas same kiel infanoj en gepatraj lingvoj komenci per simplaj esprimmanieroj. Ni devas longe fari eksperimentojn pri ili, provi diversajn esprimmanierojn por eltrovi la plej logikan dirmanieron, la plej bonan vortordon, la plej grandan belsonecon, la plej trafan

diraĵon, por lerni forstreki ĉion, kio ne estas necesa. Tiel ni akiras lingvosenton. Poste ni povas, se ni tion deziras, iom post iom transiri al pli komplikita stilo. Uzante tian ni tamen devas esti same zorgaj kiel antaŭe aŭ ankoraŭ pli.

Memkompreneble modela esperantoliteraturo ludas por la evoluo de la lingvosento la saman rolon kiel nacia literaturo por la evoluo de la sento por la gepatra lingvo.

Sed ĉu tia lingva sento vere estas necesa? Jes. Ni volas, ke esperanto taŭgu kiel internacia kulturlingvo por ĉiuj homoj kaj por ĉiuj temoj, de la plej simplaj ĝis tiuj, kiuj postulas la plej altajn kvalitojn de la lingvo. Sed tia lingvo, kulturlingvo, povas estiĝi nur per konscia kulturado de ĝi. Nenia branĉo de kulturo povas estiĝi, daŭri kaj progresi sen penado kaj senhalta laboro. Jen nia respondeco.

Kiu dum tiaj cirkonstancoj povas fariĝi bona esperantisto? Se tiaj estas la postuloj pri esperantisto, estus pli bone ne okupi sin pri la afero. Multaj homoj ne povas fariĝi unuarangaj stilistoj, eĉ ne duarangaj aŭ triarangaj, kiom ajn ili klopodas.

Nu, ankaŭ en tio ni devas kontentiĝi per la saĝo de la naturo kaj per egalvaloro kun naciaj lingvoj. Kio fariĝus el aliaj branĉoj de la kulturo, se la ĉefa intereso de ĉiuj homoj estus lingvaj aferoj? En naciaj lingvoj ekzistas multegaj gradoj de lingvoscio kaj lingvosento, de tiuj de malgranda infano kaj neinstruitaj homoj ĝis tiuj de lingvaj profesoroj kaj majstroj de belliteraturo. La profesoroj kaj la majstraj verkistoj ne malestimas la infanojn pro tio, ke ili ne scias ĉion pri la lingvo kaj ne povas uzi ĝin perfekte. Se ili estas saĝaj, ili ankaŭ neniel malestimas aŭ mokas arbarlaboriston aŭ kamplaboriston pro tio, ke li ne povas skribi leteron korekte. Same estas kaj ĉiam estos ankaŭ en la esperanta popolo. Ni havas kaj havos multegajn gradojn de lingvoscio kaj lingvosento; sed la lingvo estas komuna posedaĵo de ni ĉiuj, kaj komuna estas ankaŭ la lingvosento, ĉu granda aŭ malgranda, kaj tiel eĉ balbutanta komencanto ne estas al iu alia eksterulo aŭ naciانو.

Sed lingva sento kaj kulturado de la lingvo estas bezonataj. Tial ĉiu el ni kiel eble plej bone administru tiujn

talentojn, kiuj estas konfeditaj al ni, ili estu multaj aŭ malmultaj.

Fine mi aldonu, ke tiu ĉi artikolo tute ne estas polemiko kontraŭ sinjoro Braga. Mi bone komprenas, kion li volas diri per sia artikolo; ke esperantisto neniam ŝajnas al alia esperantisto alilingvano kaj fremdulo, ĉiuj vere estas samlingvanoj. Nur lia formulado pri la kaŭzo de tio estas iom nefeliĉa kaj erarige farita.

Nederlando dum la milito

De W. VELDMAN

La verkinto de tiu ĉi artikolo loĝas en la urbo Leeuwarden en la plej norda parto de Nederlando. La artikolo estas — sen iuj ajn ŝanĝoj — ĉerpita el letero de sinjoro Veldman al la redaktoro de MR.

La 10an de majo 1940 ni vekiĝis je la 4a matene pro muĝado de multaj flugmaŝinoj, kiuj transflugis nian urbon. Subite aŭdiĝis la maŝinpafiloj, kiuj staris sur la tegmentoj de kelkaj fabrikoj. Ni staris en la fenestro de nia dormĉambro. Fenestroj malfermiĝis. Homoj venis en la strato. "La germanoj atakas nin", ili diris. Post la surprizatako al Danujo kaj Norvegujo ni mense jam preparis nin, tamen la subita realo estis konsterna.

Neniu laboris en tiu tago. Daŭre ni aŭskultis la radion, sed ĉiuj sciigoj estis pri falŝirmilaj soldatoj tie kaj tie, pri multaj flugmaŝinoj, kiuj provis alteriĝi sur la bordo de Norda maro.

La sekvantan tagon la nederlandaj soldatoj retiriĝis, kaj kelkaj trupoj venis tra Leeuwarden. Ili iris al la fama digo, kiu ligas Frislandon al Nordholando. Unu tagon poste venis la germanoj. Ili estis gajaj, kvazaŭ ili farus plezurvojaĝon.

Mi ne povas priskribi, kion mi sentis. Mi nur bone scias, ke mi sentis strangan kontenton sciante, ke almenaŭ la unuaj centoj post eble du, tri horoj estos kadavroj. Ili estis tiom multnombraj, ke ili iris okcidenten sur ĉiuj vojoj, eĉ sur la mallarĝaj vojoj, kiuj ligas nur vilaĝeton al vilaĝeto. Ĉiuj iris en la direkto al la digo.

Ce la komenco de la digo estis kelkaj kazematoj. La gajaj, plezurvojaĝantaj germanoj ne plu pensis pri batalo. Jam preskaŭ du tagojn ili ekskursis sen kontraŭstaro. Plenplenaj estis la vojoj en la proksimo de la digo, kiam ektondris la kanonoj. Pli granda kaoso ne estas imagebla. Motorcikloj veturis de la vojoj en la apudvojjajn fosajojn. Kriado. Veado. Ŝirmejoj ne estis sur la ebenaj kampoj. La germanoj tamen alvenigis kanonojn, kaj nur kelkaj nederlandaj soldatoj savis sin rifuĝante sur la digon.

Tiam la germanoj ekiris sur la digo, sed post duonhoro ili estis en hajlodensa pafado. La motorcikloj kun apudaj veturiloj iris de la alta digo en la maron. Du semajnojn poste mi vidis centojn da motorcikloj, rustaj kaj plenaj de mara herbo.

Ankaŭ en aliaj lokoj de nia lando okazis sanga batalo, sed la germanoj estis tro multaj. Ili per bomboj detruis grandan parton de Roterdamo kaj minacis per bomboj detruiri ĉiujn gravajn urbojn, se ni daŭre defendos nin.

Venis la kapitulaco. Komence la germanoj faris sian eblon, por ke la nederlandanoj amikiĝu kun ili. Ili sendis hejmen la militkaptitajn nederlandajn soldatojn. Ili ne venis por fari el ni naciajn socialistojn. Ne, ne, ni mem decidu pri la strukturo de nia regado. Post kelkaj semajnoj tamen ekmoviĝis la enlandaj faŝistoj, kaj la germanoj agis plej stulte. Ili deklaris sin solidaraj kun ili. La sinteno de la nederlandanoj, jam ne amika, tuj fariĝis malamika.

La politikaj partioj, kiuj ne likvidis sin mem, oni per unu ordono likvidis. El la nederlandaj faŝistoj ili elektis urbestrojn kaj komunumestrojn. Ĉiujn gravajn oficistojn ili anstataŭigis per perfiduloj.

Jam organizis sin liberbatalantoj. Subteraj flugfolioj aperis, okazis intenca fuŝado al germanaj objektoj. Tiam

la germanoj komencis aresti personojn kiel garantiulojn. La kelkaj liberbatalantoj, komence estis nur kelkaj, fariĝis centoj, poste miloj. La hebreojn oni registris, ankaŭ iliajn posedaĵojn. Ili devis porti flavan stelon. Ĉe la enirejoj de parkoj, kafejoj ktp. estis afiŝaj tabuloj: "Malpermesite por judoj". Kelkaj hotelistoj rifuzis akcepti la afiŝojn. Venis taĉmento da nederlandaj faŝistoj: Tuj decidu, jes aŭ ne! Se ne, oni tuj detruos la hotelan meblaron. Oni arestis la hebreojn, kaj ili iris al koncentrejoj en Nederlando aŭ tuj rekte al Germanujo. La mebloj el iliaj domoj iris al Germanujo aŭ estis dividataj inter nederlandaj perfiduloj.

Venis ordono pri deviga laboro, komence nur por tiuj, kiuj laŭ la germanoj estis superflujaj en fabrikoj ktp. Poste la deviga laboro estis por ĉiu, kiu ne havis 50 jarojn. Nur speciala individua atesto liberigis de tia laboro. La germanaj soldatoj arestis ĉiun viron, kiu ne havis ateston. Baldaŭ atestoj estis akireblaj eĉ liberbatalantoj. La germanoj ŝanĝis la koloron kaj deklaris la unuajn atestojn ne plu validaj. Sed jam antaŭ la eldono de la novaj, la liberbatalantoj havis originalan kaj plimultigis ĝin.

La liberbatalantoj mortpafis nederlandajn faŝistojn. Tiuj sinjoroj venĝis sin al homoj ofte senkulpaĵ. Preskaŭ ĉiun semajnon falis viktimoj. Centoj da liberbatalantoj serĉis kaŝejon eĉ terkulturistoj. Miloj da viroj kaŝis sin por ne esti devigataj iri al deviga laboro en Germanujo. La germanoj organizis homĉasadojn, pafis rifuĝintojn, kiel oni pafas kuniklojn.

La rifuĝintoj bezonis kuponojn por aĉeti manĝaĵojn. Preskaŭ ĉiusemajne distribukontoroj estis rabataj. Iliaj familioj devis vivteni sin. Bankoj subite estis vizitataj de maskitaj viroj. Tiel la familioj ricevis subtenon. Liberbatalantoj suferis en malliberejo. Ili estis mortpafotaj. La kamaradoj surprizatakis la malliberejojn kaj ofte sukcesis liberigi la amikojn. Tiel ili en Leeuwarden liberigis per unu atako 45 virojn kaj virinojn.

La desegnoinstruisto de nia lernejo desegnis la sigelajn stampojn sur falsaj atestoj, ŝanĝis la naskiĝdatojn de

centoj da enlandaj pasportoj. — En la proksimo de nia lernejo estas librobutiko, en kiu estis aŭskultaparato, per kiu estis eble aŭskulti la pridemandadon, kiun faris Gestapo al kaptitoj. Ne nur la pridemandadon sed ankaŭ la kriojn, la batojn, la vcojn, la malbenojn.

La kuracistoj devis cedi pri la humanisma eco de sia profesio. Ili rifuzis. Centoj da kuracistoj estis arestataj. La aliaj iris sub la teron. Dum semajno ne estis kuracista helpo.

Majo 1943. La nederlandaj soldatoj devis anonci sin por iri en militkaptitecon. Tiam okazis ĝenerala striko. Ĝi dronis en sango. Per aŭtomobiloj la germana SS veturis de vilaĝo al vilaĝo kaj pafis ĉiun, kiu estis sur la stratoj. Se la stratoj estis malplenaj, ili pelis homojn, eĉ infanojn, el la hejmoj, starigis ilin kontraŭ muro kaj mortpafis ilin. Kun venĝema koro oni denove komencis la laboron.

Septembro 1944. La batalo ĉe la grandaj riveroj ŝajnis sukcesi. Grandaj trupoj de angloj jam estis trans Rejno. Ni esperis, jes, ni kredis firme, ke ni post kelkaj semajnoj estos liberaj. La afero tamen malsukcesis. La germanoj tiam forigis el la batalregiono milojn da loĝantoj. Nur la plej necesajn aĵojn ili rajtis kunpreni.

Sed la dume komencita striko de la fervojistoj malhelpis vojaĝon per trajnoj. Longaj vicoj da ĉiaj veturiloj iris norden, plenplenaj de virinoj, infanoj kaj gemaljunuloj kun kofroj kaj pakajoj en litkovriloj. La vojaĝo al la nordaj provincoj daŭris semajnojn. La tranokto okazis en pajloprovizitaj lernejoj aŭ preĝejoj. Ĉiunokte aliaj homoj sur la sama pajlo. Baldaŭ la tutaj mizeraj kolonoj estis infektitaj de pedikoj.

Ili vojaĝis dum pluvo kaj neĝado, sidante sur sentegmentaj veturiloj, ĉion perdinte. Kanajloj el urboj miksiĝis kun bonedukitaj homoj. En la nordaj provincoj ili ekloĝis ĉe tieaj loĝantoj.

En aprilo 1945 venis la kanadanoj. La germanoj rifuĝis okcidenten, ĉar oriente la kanadanoj jam baris al ili la vojon. Nokte la germanoj forlasis Leeuwarden. Por kaŝi

siajn krimojn ili bruligis la grandan domon de "Sicherheitsdienst".

Frumatene la sekvantan tagon komenciĝis arestado de perfiduloj. Centoj jam estis en malliberejo, kiam la lastaj germanoj ankoraŭ ne forlasis la urbon. La urbo subite estis plenplena de flagoj. Knabinaĉoj, kiuj forĵetis sin al la germanoj, en longa vico iris tra la urbo, kun la manoj interplektitaj en la nuko. Ankaŭ ili iris al malliberejo.

En la posttagmezo venis la kanadanoj. Ne estas eble por mi priskribi, kion mi sentis, kiam venis la unuaj tankoj. Sur ili estis frazoj skribitaj en jam liberigitaj lokoj, ekzemple "Zwolle libera", "Meppel libera".

La germanoj retiris sin sur la digo. Sed la kanadanoj ne riskis sekvi ilin sur la 30 km longa digo. Ankaŭ pli sude la germanoj sukcesis haltigi la kanadanojn. Grandajn polderojn ili metis sub akvon. Tutaj vilaĝoj dronis. Tiam komenciĝis la granda dramo en la okcidentaj provincoj. La manĝaĵo jam antaŭe tute ne sufiĉis, sed el la pli bonaj okcidentaj provincoj ĝis tiam venis nutraĵoj. Nun kompreneble tio ĉesis. Ĉiutage mortis centoj da homoj. Kiam la situacio estis ne plu tolerebla, okazis interkonsento sendi nutraĵojn per flugmaŝinoj. La homoj kompreneble en la komenco ne kapablis digesti la manĝaĵon, kaj nur iom post iom tio pliboniĝis.

Subite la germanoj kapitulacis. Kiam la unuaj germanaj trupoj en longaj kolonoj, kiel militkaptitoj, marŝis orienten tra Frislando, la frisoj staris ĉe la vojflankoj insultante ilin. Kelkaj volis bati ilin. Ili ĵetis ŝtonojn kaj ĉian malpuraĵon sur la "Sinjorojn". Tio okazis nur unufoje. Poste la vojoj devis esti liberaj. Ĉiu devis resti en sia hejmo, kiam la germanoj pasis.

En aŭgusto mia edzino kaj mi per motorciklo vojaĝis al Nordholando por viziti geamikojn dum kelkaj tagoj. Por ne ĝeni ilin pri manĝaĵo ni kunprenis manĝaĵon por ili, interalie funton da viando. Ĝis tiam ili ankoraŭ ne manĝis viandon. Jen la semajna porcio, per kiu ili devis vivteni sin dum la lastaj semajnoj: 1 funto da terpomoj kaj 400 gramoj da pano. Jen ĉio. La pano estis ankaŭ ĉe ni dum

la okupo terure malbona. La bakistoj mem diris, ke la pasto aĉe odoras. Sed en Nordholando ĝi tiam ne estis manĝebla. Kiel ili vivtenis sin? Sukerbetoj estis la ĉefa kroma manĝaĵo, sed ili kaŭzis diareon. Krom tio oni manĝis florbulojn. La homoj eliris por havigi al si iom da ili, sed survoje multaj mortis.

Mi parolis kun viro, kiu dufoje aĉetis panpecon por 25 guldenoj kaj 25 kg da terpomoj por 100 guldenoj. Profitemaj terkulturistoj vendis 100-funtan sakon da tritiko por 2000 guldenoj.

Ni veturis tra Haarlem—Amsterdam—Utrecht al Rhenen—Renhum—Wageningen—Vosterbeck—Arnhem. La kvin lastnolitaj lokoj estas preskaŭ nur ruinoj. Tutaj stratoj estis for. La muroj, kiuj ne falis, estis plenaj de kuglomarkoj kiel lentugoj en vizaĝo de kamparana bubo. La homoj en la ruinoj provis konstrui ŝirmejojn por loĝi. Se la domo estis ne tute falinta, ili ordigis se eble unu ĉambron. Per tabuloj el la ruinoj ili kovris la fenestrojn. Nur truo kovrita per travidebla papero donis iom da lumo. Meblaro ne plu estis, nek litaĵo. Ĉio estis detruita aŭ tute for.

En Arnhem ni iom ripozis kaj manĝis iom. Sinjoro, vidante la literon sur nia motorciklo, demandis, ĉu ni estas el Frislando. Mi diris, ke jes. "Feliĉaj vi estas", li diris. Ni ne havis alian respondon ol: "Terure, terure ĉi tie!" "100 metrojn de tie ĉi komenciĝas la kvartalo de la Rejnpono", li diris. "Tie estas multe pli terure". Sed ni ne emis vidi ĝin. Ni estis jam preskaŭ mutaj pro konsterniĝo.

Lukto kaj enmeto*

De D. VAN DER STEMPEL

Ni esperantistoj scias pli bone ol multaj aliaj, ke por efektiviĝi idealon oni devas forte batali. Sed se iu dirus al ni, ke por la triumfo de esperanto ni devas militi, mortigi homojn kaj neniigi iliajn valorojn, ni mem-

* El notlibro de belga "subterulo".

komprenoble rezignus pri nia ideo. Per esperanto ni intencas ja atingi feliĉon kaj pacon por la homaro.

Tio ŝajnas al ni simpla logiko. Tamen aliaj tiel nomataj "idealistoj", kiuj tamen multe pli firme ol ni asertas, ke ili intencas "feliĉigi" la mondon, tute ne hezitas buĉi homojn amase. Ili volas trudi al la mondo sian ideologion, perforte se necese, kaj ili ne hezitas eksplodigi militon. Por ili validas la devizo "La celo sanktigas la rimedojn". La pli multaj el ili kredas, ke ili rajtas, eĉ devas agi tiel por la bono de la homaro.

(Mi ja scias, ke aĉaj interesoj kaŝas sin malantaŭ la ŝajna idealo, sed la celo de tiu ĉi artikolo estas refuti tiajn homojn, kiuj firme kredas, ke tiaj materiaj instigiloj ne ekzistas, kaj kiuj firme fidis al la morala pureco de siaj estroj kaj ties pensoj. Al tiaj bonfidaj sed trompitaĵoj homoj mi provos montri, ke ili eraras.)

La oferitaj hekatomboj eble estus pravigeblaj, se la idealo, por kiu la homoj batalas, estus pli alta ol la homaro mem kaj ĝiaj verkoj. Sed tio estas ne ebla kaj absurda. Pli alta ol ni mem povas esti nur Dio aŭ la naturo. Sed ni batalas ja ne por la belaĵoj, valoroj kaj fortoj de la naturo.

Por kiaj valoroj ni do plenumas tiujn krimojn? Kun konsidero, ke ni mem konceptis aŭ starigis la ideojn kaj tiel faris por nia propra utilo, ni plenumas niajn agojn por valoroj malsuperaĵoj al ni mem. Se pereos ni, la kreintoj kaj profitantoj de tiuj valoroj, pereos kun ni ankaŭ la valoroj. Pro kio defendi instituciojn kaj aliajn homajn verkojn, se devas pereji tiuj, kiuj ilin kreas, ilin gardas kaj de ili profitas?

"Tamen", oni povas kontraŭdiri, "ĉu ni ne devas oferi nin por postlasi al venontaj generacioj pli bonan estontecon?" — Mi respondos: "Ĉu vi kredas, ke ni povas plibonigi la sorton de niaj infanetoj forprenante de ili iliajn gepatrojn kaj la posedaĵon de miljara kulturo? Ĉion belan, kion postlasis al ni niaj prapatroj, devenas ne de iliaj mortigoj sed de longaj kaj paciencaj laboroj kaj esploradoj."

Estas vere, ke altvaloraj homoj oferis sian vivon por la scienco, precipe por la medicino. Sed estas plene pravigita tiu ofero de kelkaj unuopaj homoj, kiuj celis sanigi aŭ savi la vivojn de milionoj da homoj. Tio estas tute alia afero ol por Himera "idealo" ofere buĉadi milionojn da homoj kaj la trezorojn de ilia kulturo.

Ĉu tio signifas, ke oni neniam devas batali? Ni devas firme batali por ĉio, kio povas plibonigi nian nunan kaj estontan ekziston, kondiĉe ke, ni tion ripetu, tio ne signifas detruon de ni mem. Tio lasta estus ne nur senfrukta kaj abomeninda sed kondukus al rezulto tute kontraŭa al tiu, kiun ni volas atingi.

La mondo povas verŝajne malhavi ideologiojn, ĝi certe kapablas ekzisti sen ili. Sed ekzistas neniu ideologio, kiom ajn nobla ĝi ŝajnas, kiu povos postvivi en mondo, kies loĝantoj pereis kun siaj kreaĵoj.

Kiel bestoj kondutas

De P TH. JUSTESEN

"Bestece!" Kiel ofte oni aŭdas tiun esprimon! Kiam homoj kondutas eksterordinare abomene, maldece, fie, krucele, oni tion karakterizas kiel bestece. Kia maljusto kontraŭ la bestoj! La bestoj, kiuj havas nur tiun deziron, ke oni (precipe la homo) lasu ilin en paco. La bestoj, kiuj nur sub unu kondiĉo atakas aliajn: por defendo kontraŭ atako aŭ malsato.

Dum pli ol dudek jaroj mi vivis en la tropikoj "inter" tigroj kaj serpentoj, dum pluraj monatoj mi loĝis en tendo profunde en la praarbaro sen iaforma protekto aŭ defendo. Neniu besto ĝenis min. Kredu min! La praarbaraj bestoj devas multe labori por sia nutraĵo, kaj se iufoje homoj farigis iliaj viktimoj, ili plej ofte mem kulpas.

Tiel perceptas la aferon la indiĝenoj en Nederlanda

Hindujo, kion oni eble ne supozus. En Sumatra mi iam sidis en mia tendo en la praarbaro parolante kun malajoj pri tigroj. Mi parolis pri kelkaj malajaj malsanuloj, kiujn mi estis kuracinta en la malsanulejo, kaj kiuj estis tre malbone traktitaj de tigroj.

Inter ili estis tre stranga kaj malofta kazo. Malfruvespere virino sidis sola kun sia infaneto en solece situanta kabano. La loĝejo estis eksterordinare primitiva. Ĝi estis konstruita sur fostoj, ĉirkaŭ unu metron super la grundo, kaj la planko konsistis nur el nefirme kuŝantaj, dikaj branĉoj, laŭeble rektaj, kaj inter tiuj estis tie kaj tie sufiĉe grandaj interspacoj. Tigro ŝteliris sub la domon, boris subite sian kapon tra la planko inter la facile moveblajn lignopecojn kaj kaptis per sia buŝego la femuron de la malfeliĉa virino kaj klopodis tiri sian viktimon tra la planko, kio tamen ne estis ebla. La bruaj krioj de la virino kaj la infano sufiĉis por timigi la beston. Ĝi lasis la virinon, kaj tiun oni post iom da tempo portis al la malsanulejo. Ŝi havis teruran vundon kaj rompitan femuroston, sed ŝia vivo saviĝis.

"Sendube estis tre malsata besto", mi finis mian rakonton. "Jes", respondis la viro. "Sed ne kredu, ke estis vera tigo. Sendube estis iu 'tjindaku', homo, kiu prenis tigran formon. Jes! Tiaj estas multegaj; sed nur dum unu monato de la jaro, nome la 'hadji'-monato, ili povas fari malutilon. Dum tiu monato ili vagas en la praarbaro kaj kelkfoje iras ankaŭ en la vilaĝojn, murdante, kie estas eble. Dum la aliaj dekunu monatoj la veraj tigroj ne toleras ilian estadon en la arbaro sed tuj forĉasas ilin, kiam ili montras sin. Tial oni ne manĝu filiklegomon dum tiu monato. Se oni tion faras, oni tutcerte renkontas tjindakun."

Estis maljuna, saĝa viro, spertulo en la aferoj de la ĝangalo, kaj mi ne protestis.

"La tigo", li daŭrigis, "estas nepre tre saĝa besto, kiu amas pacon kaj ordon. Nur kredu, ke ĝi ordigas la aferojn! Ĝi estas vera policisto en la arbaro. Komprenoble ĝi devas vivi, kaj estas neeviteble, ke ĝi manĝas kelkajn

bestojn, sed ĝi prenas nur tiajn, kiuj tion meritas. Ĉiuj bestoj devas obei al certaj reguloj, sed ne ĉiam ili tion faras. Ekzemple estas tute certe, ke tigro neniam ĝenas apropatrinon aŭ ĝiajn idojn dum la unua nokto post la nasko. Dum tiu nokto ili havu pacon por kolekti fortojn; sed se ili dum pluraj tagnoktoj restas maldiligente en la kuŝejo, la tigro venas kaj manĝas ĉiujn."

"Jes", mi diris. "Tio sonas ja tre prudente. Sed memoru la maljunan Pamukon, kiu antaŭ nelonge mortis en la malsanulejo, kaj kiu estis absolute honesta viro. Kune kun siaj du filoj li konstruis en la arbaro tri kabanojn kiel noktloĝejojn dum la senarbigo de peco da tero; sed jam en la unua nokto ili aŭdis bruegon ekster la kabanoj, kaj Pamuka eliris por esplori la kaŭzon; tuj li estis atakata de tigro, kiu preskaŭ mortigis lin surloke. La filoj rapide alvenis kaj fortimigis la beston; sed Pamuka prezentis mizeran aspekton. Preskaŭ duono de la vizaĝo estis for, almenaŭ la maldekstra okulo, la vango kaj la tuta nazo. Dek tagojn li vivis en la malsanulejo, kaj mi jam komencis timi, ke li daŭrigos vivi, kiam lia vivoflamo tute pace estingiĝis."

"Jes. Sed Pamuka kondutis nekredeble malprudente. Mi mem inspektis lian kabanon post la malfeliĉo. Li estis metinta unu el la bambufostoj en la teron kun la supra ekstremo malsupren, kaj ni scias ja ĉiuj, ke tio estas nepermesebla. Oni ja ankaŭ devas konfesi, ke estas malordo."

"Ĉu tigro vere atentis tian aferon?"

"Sen iu dubo. Tigro scias kaj atentis ĉion. Rigardu! Pamuka kaj liaj filoj loĝis en bona sinsekvo, unue Pamuka, poste la pli maljuna filo kaj fine la pli juna. Se ili estus metintaj la kabanojn laŭ alia sekvo, unu el ili tute certe estus manĝita pro tio."

"Ĉu vere? Severa procedo!"

"Jes! Sed ordo estas ordo kaj regulo regulo, kaj ni ja bone scias pri la regularo. Estas ankaŭ homoj, kiuj sidante en sia domo kuraĝas fanfaroni, ke ili tute ne timas la

tigron, aŭ ili diras aliajn stultaĵojn pri tiu sinjoro. Sed tio ĉiam havas malbonajn sekvojn. Ion tian la tigro ĉiam iel perceptas — eĉ se la vortoj estus dirataj meze en la granda urbo, kie sinjoro doktoro loĝas."

"Jes! Mi vere neniam diras ion tian."

"Ne! Tial sinjoro doktoro ankaŭ povas sendanĝere loĝi tie ĉi en la arbaro."

"Jes. Sed antaŭ kelkaj tagoj, kiam mi tre malfrue revenis de ekskurso, meze en la nokto, tigro evidente persekutis min. La sekvantan matenon estis tigrospuroj en la rivera sablo, kie mi estis irinta, kaj same estis tigrospuroj ĉirkaŭ la tendo."

"Sendube la tigro, kiu ĉefkontrolos tiun ĉi regionon, sekvis sinjoron doktoron al la tendo por certiĝi, ke ne okazos io malagrabla. Bonulojn la tigroj certe ne ĝenas."

Tiel pensis li pri la afero, kaj, kiel jam dirite, li estis maljuna, saĝa spertulo.

Kaj kial la serpentoj havas tian malbonan reputacion? Kial estis ĝuste serpento, kiu donis al Eva la pomon? Vere la reputacio ne devenas el tio, ke ili estas pli malbonaj ol aliaj, antaŭ ĉio ne ol la homoj, sed ĝi venas el tio, ke ili kapablas penetri tra nekredeble malgrandaj truoj, kaj tial estas malfacile malhelpi serpentojn eniri en domojn, kiuj estas ne tute en ordo. Sed vere ili faras nenian malutilon.

Iun tagon mi sidis skribante sur mia verando, kiam mi sentis ion strangan, malvarman super mia maldekstra maleolo — mi ne portis ŝtrumpojn. Mi rigardis kaj vidis serpenton ĉirkaŭ tridek centimetrojn longa, kiu volvis sin supren laŭ mia kruro. Mi rapide kaj forte etendis la kru-ron, kaj la serpento flugis tra la acro laŭ la planko; sed ĝi ne mordis. Kial ne? Ĉar ĝi tute ne havis malbonajn intencojn. Estis nura eraro. Eble ĝi kredis, ke mia kruro estas arbotrunko.

La pitonoj ordinare tute ne estas danĝeraj al homoj. Mi tre ofte havis ilin sub mia domo kaj vidis ilin ĝuste ekster mia tendo, sed ili neniam montris atakemon. Kompreneble venena serpento mordas, se oni tretas sur

ĝian voston, kaj kiel oni povus protesti kontraŭ tio? La tuta sekreto pri protekto kontraŭ serpentoj estas bone uzi la okulojn.

*

Antaŭ nelonge oni rakontis al mi okazon, kiu devis illustri la patrinan amon de vulpo. Oni elfosis vulpejon kaj trovis kvar malgrandajn idojn. La ĉasisto portis ilin hejmen al sia domo kaj provizoro metis ilin en kelon. La patrino tamen montris sin kapabla flarsekvi la idojn al ilia nova loĝejo, kaj dum la venonta nokto ŝi fosis tunelon sub la fundamenton de la domo, penetris en la kelon kaj forportis la idojn al la arbaro. Mirinde! Estis la patrina instinkto, kaj ni ja el sennombraj spertoj scias, kiom forta ĝi estas. Ĝi preskaŭ ne povas mirigi nin plu. Sed foje oni povas observi similaĵajn amsentojn ĉe bestoj, kie oni apenaŭ atendas tiajn.

Antaŭ multaj jaroj mi en Sumatra posedis sovaĝan katon. Estas besto iom pli granda ol ordinara domkato. Ĝi vivas en la arbaro kaj tre volonte ĉasas en oleopalmejoj, kie svarmas musoj, kiuj manĝas la falintajn olconuksojn. Mi tiutempe estris malsanulejon, kies pacientoj venis el la tiea oleopalmejo.

Iun tagon kulio venis al mi por vendi malgrandan katidon, kiun li kaptis en la kulturejo. Sendube ĝi nur por la unua aŭ dua fojo partoprenis ĉasekskurson de sia patrino. Ĝi estis tiel novnaskita, ke ĝi ankoraŭ havis restaĵon de sia funiklo; sed okulojn ĝi havis, kaj ĝi kondukis tute kiel — homo, mi preskaŭ volus diri, sed mi kompreneble devas diri kato. Ĝi siblis al mi kaj montris la dentojn. Verdire ĝi havis neniujn kaj tial devis kontentiĝi per montro de la gingivo, kiu ne imponis al mi.

Mi loĝigis la katidon en korbeto en angulo de mia laborĉambro. Komence mi manĝigis ĝin per viando, kaj ĝi volonte manĝis, sed post iom da tempo ĝi evidente malsaniĝis. Ĝia postaĵo paralizigis, kaj ĝi preskaŭ ne povis movi sin. Mi komprenis, ke estas io neĝusta pri la manĝaĵo. Lakto ne helpis. Iun tagon mi pafis paseron por ĝi,

kaj vere ĝi ŝatis ĝin. Ĝis nun mi estis doninta al la kato la saman viandon, kiun mi mem manĝis. Nun ĝi havis komencon de dentoj, kaj dum du aŭ tri sekundoj ĝi penetris en la ventrokavon de la pasero kaj glutis ĉiujn intestojn; oni preskaŭ aŭdis ĝin diri: "Nepre tion ĉi mi bezonis. Ĉu vi aŭdis nenion pri vitaminoj?" Poste ĝi manĝis la tutan birdon — kun plumoj, beko, ungoj! Nenio restis. Per tiu nutraĵo mia amiketo rapide saniĝis, kreskis kaj fariĝis bona kato, aperaĵo de beleco kaj fonto de ĝojo en mia ĉambro. Dum kelkaj monatoj ĝi estis por mi bonega amiko kaj ludkamarado.

Komence de la unua tago mia edukprincipo estis ŝajnigi, ke mi tute ne vidas ĝin. Ĝi ricevis sian nutraĵon kaj nenion pli. Kompreneble mi tre bone vidis, ke ĝi en sia angulo per siaj okuloj sekvas ĉiujn miajn movojn. Neniam ĝi elvenis el sia korbo. Neniam antaŭ certa, bela, por mi neforgesebla vespero.

Mi estis kuŝanta sur divano, kaj la kato kiel ordinare estis en sia korbo. Subite ĝi ekstaris kaj kuris rekte al la divano, grimpis laŭ unu el ĝiaj piedoj, pluen laŭ mia korpo ĝis la kaploko kaj kuŝigis sin tie ĝuste ĉe mia kapo. Kio decidigis ĝin al tiu aktiveco? Unue la sento de soleco en ĝi nun atingis iun kulminon. Ĝi ne plu povis malhavi pli proksiman kontakton kun iu vivanta estaĵo. Due fortigis en ĝi la konvinko, ke mi estas nedanĝera kvazaŭbesto, pli bona ol neniu. Trie ĝi komprenis, ke mia persono troviĝas ĉefe en la kapo. Tial ĝi metis sin apud ĝin. Mi estis mirigita, vere kortuŝita kaj ĝojoplena. Mi karesis ĝin, jetis ĝin al la plafono kaj rekaptis ĝin, lasis ĝin fari mortsaltojn en la aero ktp., kaj ĝi profunde ĝuis la ludon. De tiu momento ni estis la plej bonaj amikoj. Kiam mi sidis apud la labortablo maŝinskribante, ĝi alvenis, grimpis laŭ mia kruro ĝis la tablo, kuŝigis sin kun la dorso malsupre sur la maŝinon, etendante la kvar krurojn en la acron — kaj tiam ni komencis ludi!

Tiel foriris tago post tago kaj monato post monato, kaj mi kredas ke mia kato estis feliĉa. Sed jen ree venis memorinda vespero. Ni estis solaj en la ĉambro, kaj mi

estis skribanta. La kato kuŝis sur granda staplo da libroj. Subite ĝi saltis malsupren kaj iris al la pordo de la ĉambro kaj komencis pantomimi kun mi en tre surpriza maniero. Milojn da fojoj ĝi vidis min en- aŭ eliri tra tiu pordo, sed neniam antaŭe ĝi montris iun specialan intereson por tiu movebla parto de la muro. Nun ĝi tamen staris tie rigardante min per okuloj, kiuj parolis tute same bone kiel homa buŝo. Ĝi diris: "Bonvolu malfermi la pordon. Mi deziras vidi ion de la mondo." Estis tre eksterordinara sperto, kaj eble kelkaj el miaj legantoj ne povas kredi, ke besto povas tiel "paroli". Mi ridetis, skuis la kapon kaj respondis: "Ne! Tio ne estas ebla. Vi ja certe forkurus." Sed la rigardo persistis kaj estis nekontraŭstarebla, kaj post apenaŭ unu minuto mi diris: "Bone! Ni ja estas amikoj kaj ne volas fari malbonon unu kontraŭ la alia. Adiaŭ!" Kaj mi malfermis la pordon. Senhezite la kato saltis en la verandon kaj rapide malaperis en la nigra nokto.

Mi vere funebris. Tiu amata, belega kato! Nun ĝi estis for. Sed oni ja devas vivi la vivon, kaj mi daŭrigis mian laboron. Mi eĉ dormis dum la nokto. La sekvantan matenon mi kiel ordinare malfermis la pordon de la verando, kaj kiu sidis tie sur la ŝtuparo? La kato! Ĝi atendis, kaj tra la malfermita pordo ĝi tuj ensaltis kaj reprenis sian kutiman lokon en la ĉambro. Mi ĝojis kaj estis ege danka, kaj la tago iris kiel ordinare. Sed en la vespero la kato denove demandis elirpermeson, kaj mi diris: "Bone! Sed revenu! Multan plezuron!" Kaj mi malfermis la pordon. La sekvantan matenon neniu estis sur la ŝtuparo, kaj mi diris al mi: "Ne! Kompreneble! Ja estus nepenseble!" Post momento mi iris al la banĉambro, kaj tie la kato sidis. Ĝi estis trovinta enirvojon tra la defluilo. Tra pordoj kaj ĉambroj ĝi saltis al sia kutima loĝejo. — Sed post la tria ekskurso ĝi ne plu revenis. Sendube ĝi trovis amik- inon, kiu ne volis lasi ĝin foriri — kiel Psike kaj Amor. —

Mi havis alian, iom similan sperton pri "la parolanta kato". En la domo estis ankaŭ alia kato, sed ĝi estis tute ordinara, malsovaĝa besto, kaj la du havis neniun inter-

rilaton unu kun la alia. Ili vivis en du apartaj mondoj, la sovaĝa kato en la kontoro, la malsovaĝa ĉe la servistaro. Foje la malsovaĝa kato naskis kvar idojn, kaj iun tagon mi pruntis ilin, kiam la patrino estis for, verŝajne ĉasanta, kaj portis ilin al la sovaĝa kato por vidi, kiel ili kondutos en tia situacio. La ankoraŭ blindaj idetoj evidente kredis, ke la patrino estas reveninta, kaj avide atakis serĉante la mampintojn. La kato, kiu estis vira, lasis ilin tion fari sed tamen estis sufiĉe malfeliĉa pro la situacio. Kion, kion, kion fari? Ĝi sidis senmova apud la muro, rigardante min kaj demandante: "Kion mi faru? Mi havas ja nenion?" Post minuto mi reprenis la idojn kaj reportis ilin al ilia nesto.

Kvankam la kato finfine forlasis min, mi tamen estas konvinkita, ke ĝi havis amajn sentojn al mi. Ĉu ne?

Sed tiajn sentojn mi iam spertis ankaŭ flanke de sovaĝa birdo. Farante mian "grandan" vojaĝon en la interno de Sumatra mi iun tagon ricevis preskaŭ novnaskitan birdeton, kiun malajo prenis el nesto en profunda, senluma abismo en la praarbaro. La birdo havis plumojn sed ankoraŭ neniujn flugilojn, kaj sendube ĝi neniam antaŭe forlasis la neston kaj konis nur ĝin kaj la patrinon. Krome nenion de la tuta, granda mondo! Mi metis ĝin en lignobendan korbom kaj nutris ĝin per insektoj. Ĝi kreskis bonege, kaj post iom da tempo ĝi subite ekflugis — neniuj ekzercoj faritaj! — el la korbo kaj la tendo kaj malaperis en la ĝangalo. Funebro! Mi kaj ankaŭ la infanoj jam amis la malgrandan kreaĵon. Sed post eble duonhora la birdo revenis flugante en la tendon kaj reprenis sian lokon en la korbo. Post tio ĝi alterne restis interne ĉe ni kaj ekstere ĉe la aliaj birdoj. Ofte ĝi sidis kune kun ni en la tendo, kantetante tute pianissimo por si mem. La beko estis fermita, sed la preskaŭ neaŭdeblaj tonoj elvenis tra la naztruoj kaj komfortigis la tutan "ĉambron". Estis bona kamarado! Ĝi multe similis al nia merlo sed havis bluan spegulbrilan makulon sur la brusto. Nokte ĝi ĉiam dormis en proksima arbokrono.

Ankaŭ birdo devas fari certajn spertojn en la vivo. Iun

tagon la infanoj elpensis, ke la birdo devas baniĝi. Ili do prenis ĝin kaj metis ĝin en pelvon kun iom da akvo. La birdo terurigiĝis kaj saltis el la pelvo sed poste restis kaj senĉese rigardis la akvon, evidente pensante, ke estas tre interesa substanco kvankam en la unua momento iom terura. Subite ĝi resaltis en la akvon kaj komencis bani sin, kvazaŭ tio estus afero, en kiu ĝi estas maljuna spertulo. Ĝi vipis la akvon per unu flugilo kaj poste per la alia tiel, ke la akvo flugis kvazaŭ en ŝprucfontano. Post iom da tempo ĝi eliris el la tendo kaj sidigis sin en la sunlumo por sekigi la plumojn. Post tiu sperto ĝi ĉiun tagon iris al la rivero por bani sin.

Tamen ĝi ne travivis multajn tagojn tiamaniere, antaŭ ol ĝi spertis, ke la mondo estas plena de danĝeroj, eĉ por neofenda birdeto. Iun tagon ĝi sidis sur roketo kelkajn metrojn for de la tendo, kiam ĝi subite komencis krei kaj terurite kuris en la tendon. Mi iris eksteren por rigardi, kiakaŭze ĝi kondutas tiel strange, kaj mi tuj vidis tre malproksime en la aero aglon, kiu rondflugis en la spaco. Ĝi estis ĉirkaŭ du kilometrojn for kaj aspektis preskaŭ kiel punkto sur la ĉielo. Sed tio sufiĉis por la birdo! Estis la unua aglo, kiun ĝi vidis, sed ĝi tuj sciis, ke tie estas tre malbona kaj tre danĝera individuo. Mirinde!

Nur malmulte da tempo post la akiro de la birdeto ni transloĝis surirante altplataĵon, de kiu ni intencis malsupreniri al alia riversistemo. Sur la altplataĵo ni tranoktis. Dum la marŝo la birdo estis transportata en sia korbo, kiun portis mia filino. La korbo estis nefermita, sed la birdo la tutan tagon sidis trankvile en sia loko. Kiam ni vespere venis al la tranokta loko, ĝi tamen flugis for kaj malsupren en profundan arbarkovritan abismon. Mi ege malĝojis kaj pensis, ke neniam ni revidos la birdon. La sekvantan matenon ni manĝis kaj preparis ĉion por la plua marŝo, sed antaŭ ol ni foriris, mi promenis tra libera terpeco ĝis la rando de la abismo, en kiu la birdo hieraŭ malaperis, kaj tie mi kriis: "Hans! Hans! Hans!" Tio estis la nomo, kiun ni donis al la birdo. Kompreneble neniu Hans sin montris, kaj mi reiris al la aliaj. Sed subite tiuj

komencis ridi, ĉiuj montrante en mia direkto. Mi turnis min, kaj tie venis Hans, duone flugante, duone kurante, kaj ĝi senhezite trovis sian korbon kaj prenis lokon en ĝi.

Sed la adiaŭo! Ĉiam en la vivo ja venas la horo de adiaŭo de bonaj amikoj. Post kelkaj monatoj la vojaĝo proksimiĝis al la fino. Restis nur vizito por semajno sur la pinto de certa alta monto; kaj tien mi ne volis porti la birdon kaj multe malpli al Aŭstralio, kien ni poste estis vojaĝontaj. Ĝia natura hejmo estas la akvoriĉaj abismoj de Sumatra. Tial ĝi restu tie, kaj ni diru adiaŭ kaj dankon.

Ni do kunmetis la tendon kaj pakis niajn havaĵojn. La birdo sidis sur branĉo super la malplena kampejo. Ĝi estis tute trankvila kaj komprenis nenion. Ni adiaŭis ĝin kaj foriris. Sendube ĝi kredis, ke ni kiel ordinare revenos post kelkaj horoj. Sed ne!

Verdire ni post iom pli ol semajno dum la reveno de la montpinto pasis ne malproksime de la malnova kamploko, kaj scieme mi dum momento vizitis la lokon — kaj vere: tie estis la birdo. Ĝi sidis sur la sama branĉo, evidente atendante nian revenon! Rec mi diris adiaŭ al ĝi kaj ree foriris. Nur la memoro restas, sed ĝin mi neniam perdos.

Sciencistoj, diplomatoj kaj demokratoj

De ST. FINK-JENSEN

Ofte oni mire demandas: Kial la lingvistoj ne agnoskas kaj akceptas internacian helplingvon? Certe kelkaj tre famaj lingvistoj aprobas la ideon pri tia helpilo, kaj esperanto povas prezenti famajn lingvistojn pledantajn por ĝi, ekz. Baudoin de Courtenay (Polujo), René de Saussure (Svisujo), Cart (Francujo), Otto Jespersen (Danujo), Collinson (Anglujo).

Profesoro Jespersen iam skribis: "Estigi artefaritan ĉie kompreneblan lingvon, al kiu oni certe konfidus, kiam oni parole aŭ skribe turnas sin al iu aŭ iuj, kies naturan lingvon oni ne komprenas — tio estas facile efektivebla. Esperanto estas multoble pli facile lernebla ol iu ajn natura lingvo, ĝi estas genia kaj belsona kaj jam pruvis sian taŭgecon kiel skriba kaj parola esprimilo." Bedaŭrinde tiaj eminentuloj estas esceptaj. Ordinare la lingvistoj estas neimpresblaj aŭ malestime rifuzantaj aristokratoj.

Dum kelkaj jaroj dana lektorino — sinjorino Stemann — prelegis en Varsovio pri danaj aferoj. Oni intervjuis ŝin pri ŝia lingvoscio, kaj ŝi deklaris sian amon al la franca, la rusa, la ĉina kaj la turka. Certe la intervjuanto suspiris, ĉar tiu lingva torento estigis ĉe li la vere pravan demandon: "Ĉu ĉiuj ne devus paroli esperanton? Tiel ni evitus multajn lingvajn turmentojn." — "Pro Dio, ne! Tio forigus ĉiujn naciajn apartaĵojn, ebenigus, platigus."

Tio montras plenan nekomprenon pri la praktika esenco de esperanto. Esperanto ne forigas la nacian karakteron. Male ĝi tiel efikas, ke oni povas sendepende konservi naciajn lingvojn kaj eĉ idiomajn. Do, ĝi ne malhelpas subtilan studon de gramatikaj kaj aliaj lingvaj komplikaĵoj.

II.

La agmaniero de la diplomatio estas ofte diskutata problemo. Sed iom post iom oni atingis la konvinkon, ke diplomatoj devas esti praktikaj homoj kaj agi demokrate. Ili devas havi "bonan nazon" komercan, kaj precipe ili devas havi lingvoscion. La dana eksambasadoro en Varsovio — P. Skov — diras, ke bona diplomato devas ĝisfunde scii la anglan kaj la francan, kaj oni povas rajte postuli, ke li sciu iom de la hispana, itala kaj rusa. "Se oni sidas ĉe konferencotablo kaj ne scias la koncernan lingvon tiom, ke oni komprenas ĉiujn nuancojn en la rimarkigoj de aliaj kaj ne povas respondi kaj formuli siajn dezirojn ekzakte, la batalo estas jam antaŭe perdita, kaj la sekvoj

povas esti katastrofaj." — Li kompreneble pravus pri la situacio, sed lia postulo estas senseca. Diplomato, kiu oficas jen en Polujo, jen en Japanujo, Brazilo, Grekujo ktp, ne povas scii ĉiujn koncernajn lingvojn kaj precipe ne la nuancojn.

Oni kompreneble rajtas postuli, ke diplomato sciu la diplomatan lingvon. Kaj per la franca lingvo li nuntempe povas interrilati kun aliaj diplomatoj. Sed per ĝi li ne povas interrilati kun la koncernaj nacioj kaj rekte esplori la situacion en la lando. Oni vidas, ke eĉ en la grandaj internaciaj konferencoj oni uzas la naciajn lingvojn kaj bezonas amasojn da interpretistoj. Oni estas dependa de interpreto el kaj en lingvon, kiun oni ne konas. Interpreto, kiun oni ne povas kontroli, estas danĝera. Ne-gravaĵoj ofte fariĝas gravaj, minacaj miskomprenoj. En la pasinta tempo oni en la gazetoj ofte vidis bildojn, kiuj montris "duopan" intiman konferencon inter Stalin kaj Churchill. Tamen duope ili neniam estis, ĉar ĉiam tria persono devis ĉeesti por interpreto — pri la sorto de la tuta mondo.

Kiam von Ribbentrop oficis en Londono, li germane invitis la diplomatojn al oficokomenca festo. Ĉiu el ili respondis al tiu ofendo per letero en sia propra lingvo. Ili bone komprenis la valoron de internacia lingvo neŭtrala — eĉ se ili agnoskis nur la "aristokratan" francan.

Sed ankaŭ la diplomatio devas esti demokrata.

III.

Tio estas la vero pri internacia helplingvo, ke ĝi estas demokratigilo. Ĝi ebligas al ĉiuj normalaj homoj interkompreniĝon. Ĝi malhelpas miskomprenojn pro nesufiĉa scio pri nacilingvaj nuancoj. Ĝi devigas al sincera konduto kaj tiel ebligas konfidon.

Kiam oni invitis nederlandajn infanojn al somera restado en Danujo, oni sendis al ili "gvidanton", kiu ne sciis ilian lingvon. Ĉar la infanoj ne sciis la danan lingvon, oni povas diveni la rezulton de la "gvidado".

La militkaptitoj en Danujo estas prizorgataj de ruĝkrucanoj. Ili ne komprenas la lingvon de la mizeraj kaptitoj, kaj tiuj ne komprenas unu la alian eĉ reciproke, ĉar ili devenas el multaj lokoj de la vasta plurlingva Sovetio. Kiam mi — vane — scrĉis esperantiston inter ili, mi aŭdis la konsentan voĉon de apudstaranta neklerulo, kiu tute nediplomate kaj laŭte diris: "Jes, jen la solvo, la sola racia solvo! Se ni ĉiuj estus lernintaj tiun lingvon en la lernejo, ni ne suferus pro tiaabela kaoso, kia regas tie ĉi."

"... tio, kio estas forkaŝita de saĝuloj kaj prudentuloj, sed malkaŝita al simpluloj."

Scienco kaj esperanto

De DRO A. MILDWURF

La ekkono de la naturo akiris de la kredo unu teritorion post la alia. Apearaĵoj, antaŭ kiuj la homoj antaŭe staris sen kompreno kaj sen helpo, perdis sian sekretplanan vualon, trovis normojn kaj leĝojn. Per tio la homo fariĝis kreinto tie, kie li antaŭe povis senti sin nur ludilo en la manoj de superteraj potencoj.

La scienco finfine havas praktikajn celojn. La unuopulo kompreneble povas labori sole por si mem pro la kaŭzo de pura ĝojo de ekkono, kolektado kaj ordigado; sed kion li trovis, tio efikas plu, kaj pli malpli frue ĝi fariĝas bono por la tuta homaro.

Tio, kio estas al la homo plej proksima, plej kutima jam de la infanaĝo, rigardata kiel memkomprenebla afero ne bezonanta demandon, tio estis esplorata plej malfrue kaj estis plej malfacile ekkonata. Per tio klariĝas, ke oni ankoraŭ nun havas tiom ofte tute falsajn konceptojn pri la esenco de la lingvo, ke oni nur nun komencas starigi demandojn, kiuj devus esti starigitaj jam en la komenco

de ĉia lingvoscienco. Kiel ofte okazis en la historio de progreso, ankaŭ ĉi-rilate laiko faris la unuan signifoplenan paŝon: Fritz Mauthner en siaj artikoloj por la kritiko de la lingvo.

La scienco ekkonis jam antaŭ Mauthner, ke lingvo neniam estas memstara vivsubstanco, neniu organismo kiel la besta aŭ la planta. Ĝi estas socia apearaĵo kiel la juro, kreita por la kunvivado de la homoj laŭ mil hazardaĵoj kaj arbitraĵoj kaj iom post iom pluformata, ĝis kiam ĝi estis kompleta sistemo, kiu vere ne perfekte plenumis sian rolon kaj respondis al bezonoj de koncernaj kulturo kaj trafiko. En tio troviĝas nenio supernatura, entute nenio, kio estas ekster la ekkono de multaj aŭ de unuopaj homoj en la kampo de ilia kapablo. La klaran ekkonon de tiu veraĵo kontraŭstaras plej multe nur kutimo kaj rutino kaj iliaj sentvaloroj.

Lingvo, en kiu ni kreskis, ampleksas ĉiujn niajn travivaĵojn kaj memorojn. Kiam enamiĝinto elparolas en ravo la nomon de sia adoratino, li laŭdire cibriigas sin per la sono; en vero la nomo estas nur ŝlosilo al palaco de rememoro aŭ espero por tiu enamiĝinto. Alian homon tiu nomo eble povus konduki en inferon. Kiel songrupo, kiel lingvero, liberigita de ĉiaj personaj travivaĵoj, ĝi estas ne pli ol signo de persono: marko alpendigita por diferencigi unu personon de aliaj.

Tio sama validas ankaŭ por nomoj de objektoj, agoj, rilatoj inter homoj kaj aĵoj, unuvorte por ĉiuj lingvoelementoj kaj ilia interligiĝo. Tie ekzistas nenio, kio enhavas necsploritajn sekretojn, nenio, kio estas tiel necesege kunligita kun la vivo, ke ĝi povus esti nur tia, ne alia. Jam la multeco de lingvoj kaj la diversaj manieroj por interkompreno pri samaj aferoj pruvas arbitrecon kaj hazardon.

La lingvo devas esti perilo de niaj pensoj; ne nur perilo sed ankaŭ muldilo, en kiun ni, eĉ ne parolante, enverŝas niajn pensojn. Kion oni rajtas, kion oni povas postuli de ĝi?

Multaj asertas, ke lingvo devas ebligi perfektan bildigon de pensoj; ĝi devas esti perfekta ilustraĵo, perfekta reproduktaĵo de tio, kio formiĝas en nia pensado. Fakuloj jam montris, ke tia perfekta reprodukto per lingvo ne estas ebla pro matematikaj vidpunktoj. Sed ĝi ankaŭ neniel estas necesa, mi kuraĝas diri, ke eĉ neniel dezirinda.

Mi volas nur flanke tuŝi tiun temon. Jen ekzemple la arta uzado de la lingvo. Perfekta matematika uzado kontraŭus ĉian artan uzadon, ĉar se ekzakta reprodukto estus arte plej altvalora, en tiu okazo pentrita vaksfiguro superus klasikan marmorstatuon kaj portreton de Rembrandt. Sendube neniu, havante iom da arta sento, aprobas tian koncepton. Arta reprodukto postulas limigon; ĝi ne celas kopion de la naturo, sed volas esprimi la sentojn de la artisto. Kaj tute simila estas la afero rilate al lingvo. Historia lingvo, formiĝanta kaj tial ankoraŭ necerta, reproduktis la pensojn de tiamaj homoj ankoraŭ malpli perfekte ol en sia plej alta florado, en lirika poezio, kiu per reliefigo de la penso, eĉ se en neperfekta formo, pli profunde kaptas nin ol plej detala, ekzakta priskribo de tio, kio plenigas la poeton.

Sed alia estas la uzado por sciencaj esprimoj. Eble estus dezirinda ekstrema korekteco, perfekte konvena harmonia reprodukto. Jes, sed lingvo obliganta tion estus la plej malfacila lingvo inter ĉiuj ekzistantaj idiomoj, ĉar ĝi devus esti tiel konstruita, ke ĝi povus esprimi ĉiujn rilatojn inter kaŭzeco kaj kontraŭaj kondiĉoj. En tiu okazo estus necese antaŭ ol paroli du vortojn en tiu lingvo esti orientita pli perfekte ol estas eble en la ĉiutaga vivo kaj en la rapida pensado, kumplektita el ideasociigoj kaj konkludoj.

Tiel statas la afero, se ni dokomence postulas de arte formita lingvo neinterkonsentigeblajn kontrastojn. Ni supozu, ke esperanto ne ekzistus. Oni devus nomi komisionon por krei tian helpan lingvon, kaj estus starigitaj kelkaj gvidlinioj ekz.: tiu lingvo devas esti facile lernebla; ankaŭ simpla laboristo povu ellerni ĝin dum certa tempo. Sed aliflanke homoj, kiuj nomas sin sciencaj kaj pretendas

havi monopolon, dezirus kaj postulus, ke la plej subtilaj diferencoj de celo kaj kaŭzo, de tempaj kaj lokaj interrilatoj, derivado ktp. estu esprimeblaj.

Sed tiuj du postuloj (pri simpleco unuflanke kaj scienca ekzakteco aliflanke) estas kompareblaj kun postuloj de homo, kiu iras al mekanikisto por mendi pesilon kunigantan en si eksterordinaran fortikecon kaj senliman precizecon, per kiu estu pesibla ekz. muŝkruro kaj sakoj da terpomoj. La mekanikisto simple dirus: Tiuj ambaŭ ecoj ne estas kunigeblaj en unu pesilo. Jen mi havas pesilon por pesi terpomsakojn kaj ĉerizojn por la foiro sed ne por muŝkruroj; jen pesilo por pesi centonojn da miligramo, sed por ĉerizvendado ĝi ne taŭgas; vi bezonus multoge da tempo por finpesi unu funton.

Same ne povas esti plenumataj ambaŭ postuloj samtempe: tiu de pleja facileco kaj tiu de ekstrema ekzakteco. Krome ekzistas ankoraŭ aliaj postuloj ne tute plenumblaj, ekz. ke ĉiu popolo retrovu precipe siajn vortradikojn en la interlingvo. Kiel ĉiu aĉetanto de pesilo devas konscii pri la celo de uzo kaj laŭ tio aĉeti, tiel devas decidi tiu, kiu lernas lingvon, kiom da tempo li volas dediĉi al lernado, kaj kian gradon de sentprecizeco li intencas atingi. Estus signifoplena scienca laboro krei lingvon esprimantan en plej subtila maniero ĉion, kion oni volas esprimi.

Jes, oni diras, la preferindeco de esperanto povas esti granda, sed estas tre respondecoplena afero por la registaroj, por ĉiuj oficialaj oficoj, enkonduki ĝin, ĉar poste apenaŭ estus eble malfari tion (se ial oni tiel dezirus), kaj ŝanĝoj estus eksterordinare malfacilaj. Certe, tio estas prava. Sed oni konsideru, ke esperanto estas ses- ĝis dekoble pli facila ol la facila angla lingvo; krome jam montrigis per multjaraj spertoj, ke esperanto taŭgas por ĉiuj deziroj pri scienca kaj arta esprimado konforma al la lingva bezono, ke la esperanta vorto kapablas konduki amasojn al homogena pensado, al homogena sentado. Se efektive tiu aŭ tiu bagateleto laŭ filologia vidpunkto estas plibonigenda — ĉu nur pro tio devas atendi la mondo, kiu nepre bezonas internacian lingvon? La tuta internacia

laboro estas malfaciligita pro manko de internacia esprimrimedo!

Ni rigardu iom malantaŭen: La mondo progresis ankaŭ per dek- aŭ centoble pli malfacilaj naciaj esprimiloj. Se do tiaj neperfektaĵoj esprimrimedoj neniel malhelpis progresadon en antaŭaj tempoj, ni povas esti tute trankvilaj, ke bonege servos al ni la helplingvo esperanto, tiom facila kaj tiom bona, minimume por kelkaj miloj da jaroj; poste oni eventuale konstruu ion alian.

Trovi mankojn pri homa laboraĵo estas same facile kiel trovi mankojn ĉe la universala artistino, Naturo mem. Imagu, kiel perfekta kreaĵo estas la okulo, al kiu ni miloblan dankon ŝuldas, ĉar nur per ĝi ni povas akcepti la prezentaĵojn el la ekstermondo rilate al koloro, lumo, brilo kaj beleco; kaj nun memoru, ke granda fizikisto ŝerce diris: La okulo, rigardata de ĉe "verda tablo", havas tiom da mankoj, ke se optikisto volus liveri ĝin al mi kiel instrumenton, mi resendus ĝin kun protesto pro ĝia neperfekteco. Kiu do rajtas miri, ke ne ĉiu homa kreaĵo plaĉas al ĉiuj? Al ĉiuj plaĉi estas ne eble.

Sed la komparo kun la okulo instigas min daŭrigi jene: Por ni esperanto estas la okulo, kiu larĝigas nian mondkoncepton, al kiu ni dankas la rilatojn kun eksterlando kaj multan lumon. Por ni esperanto estas tiel kara kiel okulglobeto, kaj ni volas ĝin protekti kontraŭ ĉio, kio povus endanĝerigi ĝin. Tiusence ni ĉiuj estas unuigitaj, kaj laŭ tio devas direktiĝi nia laboro.

MALGRANDA REVUO aperas kvaronjare. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0.80 kr. Abono akceptata. Unuopaj numeroj al eksterlando kontraŭ po 3 int. respondkuponoj. Redaktoro-eldonanto: Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtĉeka konto 26 80 23.